



PENSEO

N-ro 246

apr. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Josip Pleadin (Kroatio)



MALDORME SONĜAS POETO

Hardiĝas poeta inklino ĉe nasko de tago
aŭtuna.

Ĝi armas verseman artiston per arda inspiro de
inko.

Tra ligne kadritaj fenestraj jam likas aŭroro
per blinko.

Refraktas disŝutaj radioj sur brila inkujo
latuna.

Avancas la plumo enmane, el pensoj forestas
retreto.

Laŭtakte viciĝas literoj sur blanke incita
ebeno.

Linio sekvas linion en versa senfina promeno.
Sur silka ĉineska papero maldorme sonĝas
poeto.

**Unua premio en la konkurso LITERA TURO
Vannes (Francio) 2012.*


Anteo (Ĉinujo)



kandeloj

dum la tuta tago sen elektro,
kandelojn rememoris mi en nuboj.
la suno tiujn ne povas bruligi.
kutimante kuŝi en ĉelo subtera,
ili eĉ ne povas ĝui la brilon de fulmoj.
musoj prenas ilin por manĝaĵoj iam;
ĉiam la premio estas nur urino frosta.
ofte homoj ilin ja invitas en la naskiĝtago;

tio estas ludo – larmoj kaj pereoj
akompanas frenezon afektan.
animalo volas vivi kiel planto,
sed animo estas decidua.
geamorantoj ŝtele gustumas
ruĝon artefaritan sur scenejo
sub la libera ĉielo plena de fragoj flagrantaj;
kandeloj ludas la rolojn de steloj, ne sciante ĉu
ridi aŭ plori.



Stanislaw Rynduch (Germanujo)



AL 125-a JUBILEULO

Granda estas nun omaĝo,
pro la Esperanto-aĝo.
La honoran festan jaron,
festas progressa homaro.

Antaŭ 125 jaroj,
donacis ĝin al homaro;
Ludoviko - pacifisto,
la malriĉa okulisto.

Por politiko konkera,
estis ĝi lingvo danĝera.
Malgraŭ mortoj, persekutoj,
ĝi sukcesas sen diskutoj.

Paco estas granda peno,
se ne estas la kompenso.
Grandan rekonon, progreson,

al Esperanto sukceson!

Do, trinku kun mi ĉampanon,
bonvola samideano.
Ĉie sonu nia kanto,
jubilea Esperanto!

Vivu, vivu Esperanto,
amikecon la portanto.
Per la lingvo neutrala
la kompreno ideala.



Hannes van Loggerenberg
(Nederlando)



Letero al la suno

Suno,

kion vi serĉas malantaŭ miaj okuloj,
kion vi faras sub mia haŭto?

La teniloj de miaj fenestroj
similas demandosignojn.

Polvobuloj kunvenas murmure
sub miaj mebloj.

La gazeto falas pume
en mian malluman portaleton.

Suno,

vi penas akiri tenon je mi,
vi opinias ke vi povos vidi

kie memoroj

enestiĝas, kiel planoj
antaŭenŝoviĝas kaj

ŝanĝiĝas.

*

Miaj piedoj malvarmiĝas
dum la temperaturo plialtiĝas
en ĉiuj anguloj de la mondo.

Mi ĉirkaŭpromenas la kvartalon
kaj vidas je mia reveno
ke miaj fenestroj estas malfermaj,
ke mia pordo luliĝas
per polva venteto.

La gazeto sur la tapiŝeto
heroldas pri hieraŭ
kaj la vizaĝo sur la kovrilo
estas la mia.

*

Suno,

por vi mi havas novaĵon:
Kie ajn vi brilas,
la alia flanko de la mondo
estas ĉiam malluma.

Niaj oreloj kaj niaj langoj
abolemas unu la alian.

Hieraŭ, hodiaŭ

kaj morgaŭ.

Bonan tagon, suno!



Helena Tylipska (Italujo)



La nokto

La nokto aliras sunleviĝon:

Unu alia nokto sendorma
Plenigis menson de pensoj.

Ĉiele muĝis aviadiloj
Flugantaj sud-orienten
Por vakigi siajn ventrojn.

Iuj priploras la mortintojn,
Dion de milito malbenas
Kaj ties servantojn.

Prenu iom, de mi,
da mia liberec',
kiun mi ne eluzis,
donu ĝin al la vivaj,
kiuj pacon ne konas ;

—Unu manplendon da PACO.

Cezaro (Germanujo)



celoj

Mi celojn ja havas,
la celoj tre gravas.
Mi vivas por belo,
min logas mielo.

Mi vivas por vero
kaj justo sur Tero.
Sub veloj, sur reloj,
mi venas al celoj.

La cel' estas vojo
kaj eble la ĝojo.
Volonte mi iras,
aeron enspiras.

Sub nuboj mi velas,

en rev' enĉielas.
Sed viv ' min pli ravas,
se celojn mi havas.



Lenke Szász (Rumanujo)



KARA ESTAS

Maljuna saliko riverborde staras,
Tuta ĝia trunko interne jam kavas;
Printempe kreskigis tamen etan branĉon.
Al mi ĝi instruas la naturan saĝon:

Eĉ se proksimiĝas jam al ĝia fino,
Kara estas ĉiu tago de la vivo.

Ĝamadio (Germanujo)

Karnavalo

Jen poezaj' pri karnaval',
festata kaj en urb' kaj val'.
Jen la soneg', jen la fervor',
ne plu balastas la labor'.

Ripozas la malrida ar'
anstataŭ esti granda bar'.
Ripozas ne la danca rond',
kundancas preskaŭ tuta mond'.



Guozhu (Ĉinujo)



Verda Majo Centjara



(2012-03-07)


Verda Majo iĝas centjara,
brava heroino en gloro,
ĉiam vivas en karmemoro
de ĉina popolo tre kara.

Ŝia merito senkompara
kronas ŝin inda je adoro.
Verda Majo iĝas centjara
brava heroino en gloro.

Inspiras per peno elstara
ŝia model' por ni trezoro.
Instigas nin ek al laboro,
Verda stelo ne-ordinara.

Verda Majo iĝas centjara

Leieladonna (Meksikio)



Ĉi tie

Ombroj...
doloro...
sango...
morto...
kaoso...
dolo kaj funebro...
mia urbo estas makulita
de sango...

kaj la ombroj de la nokto
ne ĉesas...
dum ĉiuj tagoj
lungaj tagoj de ombroj
lungaj tagoj de angoro
monatoj de atendo...
jaroj de atendo...
jaroj de funebro...
hodiaŭ mi ne volas pli...
hodiaŭ mi volas dormi...
kaj ne vekigi...
ĝis kiam venos la paco...



Mori (Usono)



HEREZULO

Sur la Placo
de mia vilaĝo
aperis
profeto,
arde oratoranta
pri AMO...
dum en la mano
li havis glavon
makulitan per
sango !

Timo trakuris mian korpon
kun tremantaj kruroj
mi forfuĝis
en hororo,
sed miaj kunuloj
restis tie
ensorĉite!
*
Ekde tiam
Oni nomas min;

HEREZULO!

Paŭlo Silas (Brazilo)



LA LASTA TRIBO

Dekoj da tribanoj ĉirkaŭ fajrlangoj,
Brakumitaj de plejnokta nebulo,
Nelaŭte lipblovas arbarajn melodiojn
Antaŭ elparolo de maljunulo.

Arboj silentigis siajn foliojn.
Inter si ĝustiĝis branĉaraj retoj.
Sovaĝaj noktamaĵoj bestaĵoj kvietiĝis
En malhelaj intertrunkaj vojetoj.
Sin enmetas lunradi' en tribrondon —
Jen densa, fort' osta pri propra sinzorgado —,
Etflustris ordvortojn per milda lunlumado.
Kaj la melodiblovad' ripetiĝas...
Ŝajnas, ke ĝin aŭdos la tuta mondo.

Sekve de inspiro, kiun radio
Surŝultris je tiu ĉi grava ritohoro
Lunlumante al malsupra homhejmo —
Eksentis ĝisfunde tribanoj en la koro —,
Paŝas maljunul' al la urĝa temo.

Estas li tribestro multe laŭdata
Kaj lia agado, en tribo, respektata.
Se li voĉon aldirektas al iu:
“*Pri tio ĉi-tia de tiu min prisci!*”
Oni pleninformu tuj lian peton.
Neniu lin tentu gardante korsekretan!

Ĉesis melodi', tribestro parolas.
Elluna potenco la ĉefon ĉirkaŭgloras:

Mi vidis la stelojn timantajn la nokton,
Atingis mi, pere de alta lok', tondron.
Enfalas en maron profundan la fulmo.
Mi flaris la mankon de akvo sub pluvo.
Ĉeeston de mia animo en nigro
Enhavis la voloj petante sciigon
Pri saĝo, pri konoj neniam publikaj,

Pri ludoj sangvetaj, sed certe riĉigaj.
Mi sentis la sinon de homoj velkantaj
Lokitaj en urboj fiere kreskantaj.
Mi ploris la falon de arboj grandaĝaj.
Konstruon, *mi miris!*, de tuboj fekkraĉaj!
Birdetoj, ne kantu belaĵojn de l' mondo,
Ĉar baldaŭ fariĝos el ili nur sonĝo.
Natura regado finfinas ĉe ĉie.
Anstataŭ ridete, prefere: elkrie!
Ho lastaj amantoj de pura vivado,
La jenan flamegon turmentas malsato.
La manojn ni lasu pendigi la vero:
Pri solv' elĉerpiĝis la tuta espero!
Kaj kune ni finu ĉi tiun historion
Ĵetante nin mem en ĉi fajro-tragedion...



Manuel Bandeira(1886-1968)

MISTIKA PIEROTO

Tuj revenu al mi Kolombina!
Ne serĉu ĉe l' brakoj de aliaj
la fajna ĵojn de preska ŭ senfina
volupto de la brakumoj miaj.

Amoron, tiun preska ŭ perforton,
povos atletoj al vi ja doni...
Nur mi, tamen, la naivan sporton
tikle karesi povas proponi...

Miaj magraj fingroj senalarme
dorlotos vin je ĉiuj anguloj
por ke, ĉesante esti s enlarne,
iĝu du lagoj viaj okuloj...

Tiam, ĉe l' ekstaza mia spiro,
ho se vi povus, frivola predo,
senti ke ĝi estas ne suspiro,
sed mia tristo jam sen rimedo!...

Ja malsaĝa estas kiu celas
 amon ĉe dioniza furio!
 Subita posed' por mi malbelas:
 Volupt', jen kaprica elegio...

Volupt' estas nebulo, kaj tie
 melankoli' en abismoj kuŝas...
 Flor' el tristaj marĉoj, kiom plie
 ties viv', ne morto, sombre fuŝas...

Mia anim' de amant', lírika,
 en disŝiro el plorĝem' sen fino,
 mia anim' naiv-ezotika
 longe sopiras sur sia sino:

Ne al ĝojoj el malĉasto, fiaj,
 male, al tiuj rozoj simbolaj
 de l' pasi-amaj teneroj viaj
 grandaj mistikaj kaj senkonsolaj!...



esperantigis



Ŭel (Brazilo)

Joachim Ringelnatz*

Am' plej mallonga

Mallertaj kampuloj, kiuj la bonulan
 Saluton de l'burĝoj ne recipokas,
 Homoj, kiuj per duona kapsigno dankas
 Sen nur levi la okulojn.
 Prudaj, timemaj virinoj, silentaj
 Geknaboj, dignaj olduloj –

Sed, kiam preter vilaĝ' aŭ kamp'
 Aŭ arbar' muĝas cia trajn',

Ci el la vagon' rigardas :

Jes tiam staras – staras tiuj ankaŭ
 tute al ci kontraŭ,
 Sur dekliv', ĉe pordeg' de l'stal', en l'herbejo.
 Kaj salutas ili, grandgeste salutas
 Kaj ade.

Plenformajn salutojn liberajn
 Je ci kaj ciaz samveturantoj.

Kaj
 La plej pura am' elfluas
 For.

** Joachim Ringelnatz: Germana poeto*

Esperantigis



**Roland Platteau
 (Francujo)**



JUHÁSZ GYULA

SEKRETA SENCA ROZO

Vortigos, eble, mi neniam
 Dolore ĝuan senton mian.

Juvelon en skatol' diskreta,
 Ĉi-senton gardos mi sekreta.


Sanktas silent', sekreto sankta,
 Ĝistombe min akompananta.

Sed en l' okuloj nur vi brulos,
 Suspiroj miaj al vi flugos.

Kaj mia sango pro vi bolos,
 el mia polv' pro vi ekfloros

La nigra rozo de ĉagreno.
Sen vi - mensog' nur la edeno!

elhungarigis



Jozefo E. Nagy

(Rumanujo)

Korektado

En Penseo 245, la poemon "Nia sola posedaĵo" verkis Julius Balbin, usona poeto poldevena, kaj ne Josefo E. Nagy, kiu fakte tradukis ĝin en rumanan kaj hungaran. Pri nia malzorgemo, ni petas pardonon de la tradukinto.

redakcio

Mutiu OLAWUYI*

KIO MI ESTAS

Mi estas malplena barelo,
Mi estas sensona tamboro,
Mi estas senvoĉa gongo;
Mia sinonimo estas "nenio!"

*Mutiu Olawuti: "La Ĝangalpoeto"

esperantigis



Benjameno KRAŬS

(Usono)

Ĉineske

Guozhu(Ĉinujo)

Centjara Jubileo de Verda Majo

—laŭ ĉinesko Yongyuyue*

La sepa de/ marto estas/ dat-reveno
de centjara/ Verda Majo./ Al la kunveno
jubilea/ ni venas kun/ kar-memora beno.
Post himno/ / jubilas refreno

de rondelo./ Prelego pri/ historia sceno
per lumbildoj./ Esperanta/ kuko. Soleno.
En salono/ okulfrape/ ruĝas ciklameno
omaĝe/ al feina/ brava veno!

Eĉino (Guozhu) 2012-03-07

* Yongyuyue (Ĉiama ĝojo de renkontiĝo): ĉina
fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 444, 445,
446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,
xxa, xxa, xxa (x=senrima)

Veĵdo (Ĉinujo)



Ek al printempo

—laŭ ĉineska Dekses-Silabo*

varm'

eta bloviĝas al farm'

verdigas

teron per herb-svarm'

el

blanka glacia kruel'

glugle l' flu'

impetas kun ŝvel'

sun'

ĵetas pli varmajn jam nun

radiojn

kun brila fortun'

vent'

blovas jam sen pika dent'

karese

per ĝojiga sent'

ter'

el longa frost' de mizer'

moliĝas

kun vol' de esper'

ĵus

ŝosoj kun krevita buŝ'

junverdas

sub pluveta duŝ'

bru'

ĝoja birda sen enu'

muzikas

por reviva ĝu'

nur

vivoj lante kun plezur'

moviĝas

en bela natur'

mond'

la homa en viva ond'

avidas

je rea renkont'

temp'

plene en aroma tremp'

alvenas

jen ek al printemp'



Cindy Mckee (Usono)



Printempo ebriligas ĝardeniston

—laŭ ĉineska Dekses-Silabo*

plant'

mi konfuzas vin kun kant'

kvin sentoj-

unu, en diant'

plant'

vi junas, sed diamant'

kompare

estas diletant'

plant'

arbo estas elefant'

pli plaĉas

via dolĉa kvant'

Viktoro (Ĉinujo)

Atendado

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

Jam

neĝ' rigide per malvarm'

katenas

min jen sen balzam'.

mi

jam ŝlosis min sen konsci'

pri tempo

kun kora anksi'

sed

mi atendas sen rimed'

kviete

jen ĝis frosta ced'

ĉu

printempo tre distas nu

se vintro

paŝas kiel flu'

*Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)



Maupassant (1850-1893)



LA TIMO

La trajno plenvapore rapidis en la tenebroj.

Mi troviĝis sola, vidalvide al maljuna sinjoro, kiu rigardis tra la pordo du vagono. Tiu veturilo de la fervoja kompanio P.L.M. [Parizo - Liono - Marsejlo] forte haladzis la fenolon, kaj sendube venis de Marsejlo.

Tio okazis dum varmega nokto, sen luno kaj sen aero. Ni tute ne vidis stelojn, kaj la blovo de la rapida trajno ĵetis al ni ion, kiu estis varma, mola, lacegiga, nespirebla.

Foririnte de Parizo jam de tri horoj, ni iris al la centro de Francio, vidante nenion de la trapasataj landoj.

Subite estis kiel fantasta aparaĵo. Ĉirkaŭ granda fajro, en arbareto, du viroj estis starantaj.

Ni vidis tion dum unu sekundo: estis, ŝajnas al ni, du mizeruloj vestitaj per ruĝaj vestaĉoj, en la luma brileto de la fajrejo, kun iliaj barbaz vizaĝoj kiuj rigardis al ni, kaj ĉirkaŭ ili, kiel drama dekoro, la verdaj arboj, el hela kaj brila verda koloro, la arbtrunkoj trafitaj de la viva rebrilo de la flamo, la foliario trapasita, penetrita, kiel malsekigita de la lumo, kiu enen fluis.

Poste, denove ĉio refariĝis nigra.

Certe ja, tio estis tre stranga aparaĵo! Kion faris tiuj du ŝtelvaguloj en tiu arbaro? Kial tiu fajro en tiu sufoka nokto?

Mia kunvojaĝanto eltiris sian poŝhorloĝon kaj diris al mi:

– "Estas ekzakte noktomezo, Sinjoro, ni ĵus vidis strangan aferon."

Mi konsentis pri tio, kaj ni ekis interbabili, serĉante tion, kio povis esti tiuj uloj: ĉu estis krimuloj kiuj bruligis pruvojn, ĉu sorĉistoj kiuj pretigis magian trinkaĵon? Ĉu oni ekbruligas tian fajron, noktomeze, someromeze, en arboro, por kuiri la supon? Kion do ili faris? Ni ne sukcesis imagi ion verŝajnan.

Kaj mia najbaro ekparolis... Li estis maljuna viro, kies mi ne sukcesis determini la

profesion. Ja certe, iu originalulo, tre klera, kaj kiu eble ŝajnis iom frenezeta.

Sed ĉu ni scias, kiuj estas la saĝuloj, kaj kiuj estas la frenezuloj, en tiu vivo en kiu la saĝeco devus ofte nomiĝi stulteco, kaj la frenezo nomiĝi genio?

Li diris:

– Mi estas kontenta, pro ke mi vidis tion. Dum kelkaj minutoj, mi travivis malaperintan sensacon!

Kiom antaŭe la tero devis esti sensemocia, kiam ĝi estis tiom mistera!

Samtempe, kiam ni levas la vualojn de la nekonataĵoj, ni senpopoligas la imagopovon de la homoj. Ĉu vi ne trovas, Sinjoro, ke la nokto estas ja malplena, kaj ĝia nigro ja vulgara, de antaŭ ne plu ekzistas aparaĵoj?

Ni diras al ni: "Nek fantasto, nek strangaj kredoj, la tuta neklarigeblaro estas klarigebla. La supernatureco malaltiĝas kiel la akvonivelo de lago, kiun kanalo elĉerpas, la scienco, iom post iom, regresis la limojn de la mirrakontaro."

Nu, Sinjoro, mi apartenas al la malnova raso, tiu kiu ŝatas kredi. Mi apartenas al la malnova naiva raso, alkiutiĝinta ne kompreni, ne serĉi, ne scii, kiu akceptas la ĉirkaŭajn misterojn, kaj malkonsentas al la simpla kaj preciza vereco.

Jes, Sinjoro, deboskigante la nevideblaĵojn ni senpopoligis la imagopovon. Nun nia tero aperis al mi kiel mondo forlasita, malplena kaj nuda. La kredoj, kiuj igis ĝin poezia, estas foririntaj. Kiam nokte mi eliras, kiom mi volus tremeti pro tiu angoro, kiu krucosignigis al si la maljunulinojn laŭlonge de la muroj de la enterigejoj, kaj forkuris la lastajn superstiĉulojn antaŭ la strangaj vaporoj de la marĉoj, kaj la kapricaj vaglumoj! Kiom mi volus kredi al tiu svaga kaj timiga aĵo, kiun oni imagis al si senti pasi en la ombro.

Kiom antaŭe la mallumo de la vesperoj devis esti malhela, terura, dum ĝi estis plena de fabelaj kaj nekonataj estaĵoj, de malicaj

ŝtelvaguloj, kies ni ne povis diveni la formojn, kies antaŭtimo frostigis la koron, kies okulta potenco transpasis la limojn de nia penso, kaj kies atingo estis neevitebla?

Kun la supernatureco, la vera timo malaperis de la tero, ĉar ni vere timas la aferojn, kiujn ni ne komprenas. La videblaj danĝeroj povas emocii, malserenigi, timigi! Kio estas tio kompare kun la konvulsio donita al la animo de la penso, kiam ni tuj renkontos kun vaga fantomo, kiam ni tuj suferos la brakumadon de mortinto, kiam ni tuj vidos alkuri unu el tiuj timigaj bestoj, kiujn inventis la teruro de la homoj? La tenebroj ŝajnas al mi helaj, de antaŭ ili ne plu estas hantitaj.

Kaj la pruvo pri tio, estas ke se subite ni troviĝus solaj en tiu arbareto, ni estus obsedataj de la bildo de la du apartaj estaĵoj, kiuj ĵus aperis al ni en la lumeto de fajro, pli multe ol de la antaŭtimo de ajna kaj reala danĝero.

Li rediris: "Ni vere timas tiun, kiun ni ne komprenas."

Kaj subite memoraĵo venis al mi, la memoraĵo pri rakonto, kiun diris al ni Tourgueneff [Turg'nef], iun dimanĉon, ĉe Gustave Flaubert [Gustavo Flober].

Ĉu li skribis ĝin ie, mi tute ne scias.

Neniu pli ol la granda rusa romanverkisto sciis pasigi en la animon tiun tremeton de la vualita nekonataĵo, kaj en la duonlumo de stranga fabelo, lasi duonvidi tutan mondon de maltrankviligaj, necertaj kaj minacaj aĵoj.

Kun li, ni bone sentas la konfuzan timon de la Nevideblaĵo, la timon de la nekonataĵo, kiu estas malantaŭ la pordo, malantaŭ la videbla vivo. Kun li, ni estas bruske transpatis de dubaj lumoj, kiuj sufiĉe lumigas por nur pliigi nian angoron.

Iafoje li ŝajnas montri al ni la signifon de bizaraj koincidoj, de neatenditaj proksimiĝoj de cirkonstancoj eksternvide hazardaj, sed kiujn gvidus kaŝata kaj insidema volo. Kun li, ni kredas senti nepercepteblan fadenon, kiu

gvidas nin tra la vivo per mistera maniero, kiel tra nebula sonĝo, kies senco senĉese eskapas al ni.

Li tute ne eniras aŭdace en la supernaturecon, kiel Edgar Poe aŭ Hoffmann, li rakontas simplajn fabelojn, en kiuj miksiĝas nur io iom svaga kaj iom emocia.

Tiun tagon, li ankaŭ diris al ni: "Ni vere timas tiun, kiun ni tute ne komprenas."

Li sidiĝis, aŭ prefere li sternaĉis sin en granda fotelo, kun la brakoj pendantaj, la kruroj etenditaj kaj malfirmaj, la kapo tute blanka, dronanta en tiu granda fluo de barbo kaj arĝentaj haroj, kiuj aspektigis lin kvazaŭ la Eternulo aŭ Rivero de Ovidio.

Li malrapide parolis, kun iu pigreco, kiu donis ĉarmon al la frazoj, kaj iun heziton de la prononco iom peza, kiu substrekis la kolorriĉan ĝustecon de la vortoj. Liaj palaj okuloj, malfermegaj, esprimis kiel infanaj okuloj, ĉiujn emociojn de lia penso.

Li rakontis tion al ni:

Kiam li estis fraŭlo, li ĉasis en arbaro de Rusio. Marŝadinte dum la tuta tagdaŭro, ĉirkaŭ la fino de la posttagmezo, li alvenis sur la bordon de kvietra rivero.

Ĝi fluis sub la arboj, tra la arboj, plena je flosantaj herboj, profunda, malvarma kaj klara.

Postulema bezono ekkaptis la ĉaŝiston, ke li sin ĵetu en tiun travideblan akvon. Li senvestiĝis kaj impetis en la fluon. Li estis tre granda kaj tre forta knabo, vigla, kaj aŭdaca naĝanto.

Li lasis sin milde flosi, kun la animo trankvila, tuŝetata de la herboj kaj la radikoj, feliĉa senti kontraŭ sia karno la leĝeran glitadon de la lianoj.

Subite mano sin metis sur lian ŝultron.

Li sin turnis per skuo, kaj ekvidis timigan estaĵon, kiu avide rigardis al li.

Tio similis virinon aŭ simiion. Ĝi havis grandegan, faldatan, grimacanta vizaĝon, kiu ridis. Du nenomeblaj aĵoj, sendube du mamoj,

floŝis antaŭ ĝi, kaj supermezuraj haroj, miksitaj, brunbruligitaj de la suno, ĉirkaŭis ĝian vizaĝon, kaj floŝis sur ĝia dorso.

Tourgueneff sentis sin trapasata de la hida timo, la glacia timo de la supernaturaj okazaĵoj.

Ne pripensante, ne prikalkulante, ne komprenante, li freneze ekaĝis al la bordo. Sed la monstro naĝis ankoraŭ pli rapide ol li, kaj tuŝis al li la kolon, la dorson, la krurojn, kun etaj ĝojaj rikanadoj. La fraŭlo, freneza pro teruro, fine trafis la riverbordon, kaj plenrapide impetis tra la arbaron, ne eĉ pensante repreni siajn vestojn kaj sian pafilon.

La timiga estaĵo sekvis lin, kurante tiel rapide kiel li, kaj grumblante senĉese.

La fuĝanto, ne plu havante fortojn, kaj kripla pro teruro, estis falonta, kiam infano, kiu gardis kaprinojn alkuris, armita per vipo, li ekfrapis la forlogan homan beston, kiu forkuris eligante kriojn pro la doloro. Kaj Tourgueneff vidis ĝin malaperis tra la folario, simila al femalo de gorilo.

Temis pri frenezulino, kiu vivis jam de pli tridek jaroj en tiu arbaro, dank'al la bonkoreco de la ŝafistoj, kaj kiu pasigis la duonon de la tagoj naĝante en la rivero.

La fama rusa verkisto aldiris: "Mi neniam tiom timis dum mia vivo, ĉar mi ne komprenis tion, kio povis esti tiu monstro."

Mia akompananto, al kiu mi diris tiun aventuron, reparolis:

— Jes, ni timas nur la eventojn, kiujn ni ne komprenas. Ni vere sentas la hororan konvulsion de la animo, kiu nomiĝas teruro, nur kiam miksiĝas al la timo iom de la superstiĉa teruro de la pasintaj jarcentoj. Persone, mi spertis tiun teruron kun ĝia tuta hororo, kaj tio por evento tiom simpla, tiom stulta, ke mi apenaŭ aŭdacas diri ĝin.

Mi piede vojaĝis tra Bretonio, tute sola. Mi jam travizitis Finistère [Terfinon], la dezertajn erikejojn, la nudajn terojn kie kreskas nur la uleksoj, apud grandaj

malprofanaj ŝtonoj, fantomitaj ŝtonoj.

Antaŭtage mi vizitis la sinistran pinton de Raz [Ra], tiun finon de la malnova mondo, kie eterne interbataladas du maroj: Atlantiko kaj la manika Kanalo, mi havis la spiriton plenan de legendoj, de rakontitaj aŭ legitaj fabeloj pri tiu tero de kredoj kaj superstiĉoj.

Kaj mi nokte iris de Penmarch [Penmarŝ] al Pont-l'Abbé [Ponto-la-Abato]. Ĉu vi konas Penmarch? Plata marbordo, tute plata, tute malalta, pli malalta ol la maro, ŝajnas. Ĉie oni vidas tiun minacan kaj grizan maron, plenan de bavemaj rifoj kvazaŭ furiozaj bestoj.

Mi vespermanĝis en kafejo de fiŝkaptistoj, kaj nun mi marŝis sur la rekta vojo, inter du erikejoj. La nokto estis tre nigra.

De tempo al tempo, druida ŝtono, simila al staranta fantomo, ŝajnis rigardi min pasi, kaj iom post iom malpreciza timo eniris en min, timo pri kio? Mi tute ne sciis. Iujn vesperojn, oni sin kredas tuŝetata de la spiritoj, kiam la koro batadas, timante konfuze tiun nevideblan aĵon, kiun mi bedaŭras.

Kiom longa tiu vojo ŝajnis al mi, longa kaj senfine vaka.

Neniu bruo ol la ronkado de la ondoj, tie for, malantaŭ mi, kaj iafoje tiu monotona kaj minaca bruo ŝajnis tute proksime, tiom proksime, ke mi kredis ilin tuj post mi, kurante tra la ebenaĵo kun sia ŝaumofronto, kaj mi emis forkuri, rapidege forfuĝi antaŭ ili.

La vento, tanĝa vento, blovante per skualoj, sibligis la uleksojn ĉirkaŭ mi. Kaj, malgraŭ ke mi rapidegis, miaj brakoj kaj miaj kruroj suferis malvarmon, aĉan malvarmon pro angoro.

Ho! Kiom mi volintus renkontiĝi kun iu!

La nokto estis tiom nigra, ke nun mi apenaŭ distingis la vojon.

Kaj subite mi aŭdis antaŭ mi, tre malproksime, rulbruon. Mi pensis: "Nu! iu veturilo!" Poste nenion mi plu aŭdis.

Post unu minuto, mi distingeble perceptis la saman bruon, pli proksime.

